

Svisa Esperanto-Societo informas

jaro 2000 numero 5-a: novembro / decembro

Redakcio:

Claude GACOND, Poŝtfako 5031, CH-2305 La Chaux-de-Fonds 5

Retpoŝto: <gacond@bluewin.ch>

☎ ĉe CDELI: 032 967 68 55, hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29; indiki: por Claude GACOND

Grava studsabato por la uzantoj de komputilo André GROSSMANN, informadikisto instruos al ni kiel esperantigi nian komputilon

La Chaux-de-Fonds, sabaton 18-an de novembro
CDELI, Biblioteko de la urbo, salono 1-a etaĝo

9h00: Malfermo de la salono. (Kiuĵ kunportos sian komputilon, por povi surloke eninstali poresperantajn sistemojn kaj ekzerciĝi per ili, tiuj povos haltigi sian aŭtomilon en la lerneja korto).

10h00-12h30: instruo kaj ekzercoj, 12h30-14h15: tagmanĝo en najbara italeca restoracio, 14h15-16h00: Instruo. André GROSSMANN klarigos pri la diversaj supersignaj sistemoj kun prezentado de karakteroj, tiparoj, kodoj uzataj en la diversaj tiparoj. Li montros solvojn por skribi la esperanto-literojn en Word, Publisher kaj Outlook, klarigos kiel krei klavo-mallongigojn, proponos makroojn por transkodiĝi de x-sistemo aŭ h-sistemo al esperanto-literoj kaj inverse, ekzercigos ilian instaladon kaj uzadon. Kaj li respondos al ĉiuj eblaj helpdemandoj.

Kurskotizo: po CHF 20.- por partoprenanto, kiu bonvolu anonci sian partoprenon al Claude Gacond ĉu poŝte: CP 5031, 2305-La Chaux-de-Fonds 5; ĉu telefone: 032 926 52 32 (hejmo) aŭ 032 967 68 55 (CDELI); ĉu rete: gacond@bluewin.ch.

Rememorigilo

SES-estraro

Bruno GRAF, prezidanto, Jurastr. 23, 3063 Ittigen/Bern. bgraf.o@bluewin.ch.

Perla MARTINELLI, Vicprezidanto, BP 232, 6830 Chiasso. heroldo@tin.it.

Nicole MARGOT, sekretario, Ch. des Lys 4, 1010 Lausanne. nmargot@vtx.ch.

Elisabeth LAUPER, kasisto, République 13, 2300 La Chaux-de-Fonds. elilauper@bluewin.ch.

Dietrich WEIDMANN, kunlaboras en la informado, PF 301, 8034 Zürich. info@esperanto.ch.

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo
2300 La Chaux-de-Fonds

Anoncoj en "SES informas"

Paĝo	Neesperantistoj & komercaj	Esperantistoj & nekomercaj
1/8	CHF 40	CHF 20
¼	CHF 70	CHF 35
½	CHF 110	CHF 55
1/1	CHF 180	CHF 90

SES informas

Redaktaj datlimoj

Por *SES informas* N° 2001-1 (januaro-februaro 2001) la redakta datlimo estas fiksita je la 20-a de decembro 2000.

N° 2001-2 (marto-aprilo): 20-a de februaro.

N° 2001-3 (majo-aŭgusto): 20-a de aprilo.

N° 2001-4 (septembro-oktobro): 20-a de aŭgusto

N° 2001-5 (novembro-decembro): 20-a de oktobro.

Svisa kalendaro

www.esperanto.ch/kalendaro

svisa esperanto-kalendaro en la reto

Ekde la 1-a de novembro aperos regule aktualigita, kompleta kalendaro pri ĉiuj esperanto-eventoj, kunvenoj, konferencoj, ktp. ie ajn en Svislando. Tiun kalendaron redaktos Esperanto-Societo Zürich. Ĝi ankaŭ aperos en "*SES informas*".

Por ke la kalendaro vere estu plena, la estraro de SES alvokas ĉiujn organizantojn kaj aktivulojn tuj post fikso de dato havigi la

informon retroŝte al info@esperanto.ch aŭ per ordinara poŝto al Esperanto-Societo Zürich, poŝtfako 858, 8034 Zürich. Memkompreneble sendu la informon ĉiam ankaŭ al la redaktoro de "SES informas", al kiu vi krome ankaŭ havigu viajn apartajn en la revuo publikigitajn informojn pri tiuj eventoj.

Kompreneble unu ideo kaj funkcio de ĉi tiu kalendaro estos, ke aktivuloj antaŭ elekto de dato unue konsultu la retkalendaron por eviti, ke "konkurenca" aranĝo okazu samtempe.

Dietrich WEIDMANN

Svisa kalendaro de la okazontaĵoj

2000 novembre

- 06 Lausanne kunveno
 - 07 La Chaux-de-Fonds studrondo
Genève kunveno
 - 08 Wil kunveno
 - 09 SES laborgrupo pri varbado en Bern
 - 11 Basel kunveno
 - 16 Luzern kunveno
 - 18 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds
 - 22 La Chaux-de-Fonds studrondo
 - 25-26 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds
- ### decembre
- 06 Wil kunveno
 - 09 Basel zamenhofa festo en Freiburg

- 10 Lausanne zamenhofa festo
- 13 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 16 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds
- 16-17 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds

2001 januare

- 10 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 20 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds
- 23 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 27-28 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds

februare

- 14 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 17 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds
- 24-25 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds

marto

- 13 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 17 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds
- 24-25 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds
- 28 La Chaux-de-Fonds studrondo
- 31 Asembleo de LF-koop La Ch.-de-Fds

aprilo

- 07 SES Ĝenerala Kunveno en Bern
- 12-16 KCE kurs-sesio La Ch.-Fds
- 28-29 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds

majo

- 19 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds
- 26-27 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds

junio

- 16 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds
- 23-24 KCE monاتفino La Ch.-de-Fds
- julie 21 ĝis 28 Zagreb (Kroatio)
86-a Universala Kongreso de Esperanto

- julie 31 ĝis aŭguste 20 KCE
kurs-sesio La Chaux-de-Fonds

oktobre

- 20 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds

novembre

17: CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds

decembre

15 CDELI studsabato La Ch.-de-Fonds

Ne forgesu sendi viajn sciigojn ĝis la 20-a de decembro, por ke ili troviĝu en la kalendaro de "SES informas" 2001-1 (januaro-februaro 2001).

Vivo de SES

La Estraro informas

La estraro kunsidis la 21-an de oktobro en Bern. Jen resume informojn al la SES-anoj.

Aperis en la franclingva por-instruista gazeto "L'Éducateur" la anoncita tripaĝa artikolo titolita "Une autre variante: l'espéranto", kiun verkis Mireille GROSJEAN sub la pseŭdonomo Sophie GRAUBERT.

Plena sukceso estis la publika prelego, subvenciita de SES kaj organizita en Genève far La Stelo la 21-an de septembro. Antaŭ publiko de pli ol cent personoj Claude PIRON oratoris franclingve pri la temo "Les langues: un monde fascinant". Unu tagon antaŭe aperis en la grava romanda gazeto "Le Temps" tut-paĝa provoka intervjuo kun Claude PIRON kaj Marion BELISLE, kiu parolas esperantlingve kun sia du-jara filo Romain.

La laborgrupo pri varbado kunsidis la 9-an de decembro en Bern.

La estraro komentis la rezulton de la farita enketo rilate la kolektivitan abonon al "Literatura Foiro". Ni respektos la volon de la membraro, ke ni konsistigu du membro-kategoriojn, tio estas membroj kun kaj membroj sen LF. Tio ebligas malaltigi la kotizon de la membroj, kiuj ne deziras ricevi la revuon LF.

La estraro konfirmis sian celon plibonigi la servojn kaj transformi la organizajn strukturojn de nia movado paŝon post paŝo; ekzemple ligi al SES la esperantistojn kaj simpatiantojn, egale ĉu ili estas membroj aŭ ne, aŭ helpi organizi al malfortaj grupoj aŭ subteni la kreon de novaj grupoj. Kiel jam anoncote nia redaktoro aktualigas liston de interesatoj, lernintoj kaj simpatiantoj kaj sendas al ili nian bultenon, al kiu

aldoniĝos nacilingvaj tekstoj, ĉar ne ĉiuj novuloj kaj simpatiantoj bone regas esperanton.

Ni restartigas la gazetaran servon. La estrarano kaj komisiito Dietrich WEIDMANN aktualigis retroŝtatan liston de la svisaj redakcioj kaj komencis sendi al ili komunikojn. Stabo kolektos kaj redaktos novaĵojn en la lingvoj germana, franca kaj itala.

Laŭ peto de la ĝenerala kunveno la estraro reekzamenis la abonon al medio-observanta firmao kiel Argus. Por redukti la kostojn Dietrich WEIDMANN proponis trovi abonantojn, kiuj dezirus ricevi kopion de la gazetartikoloj pri esperanto. Li prizorgos la kopiadon kaj dissendadon de tiuj artikoloj kaj la organizon de la rebat-servo, kio meritas dankon. Vidalvide de tiu nova situacio la estraro decidis reaboni al Argus kaj prijuĝi la rezulton post unu jaro. La lokaj kaj fakaj societoj kiel ankaŭ la membroj ricevos inviton kaj oferton por aboni al tiu servo.

La estraro danke akceptis la kreon de kalendaro pri la svisaj esperanto-eventoj. Dietrich WEIDMANN malfermos kalendaron en la reto kaj Claude GACOND en "*SES informas*". Legu la koncernan komunikon.

La kasistino Elisabeth LAUPER raportis pri la malfermo de poŝta ĉekokonto kaj de ŝparkonto ĉe la WIR-banko. Ni konstatis, ke parto de la membroj ankoraŭ ne pagis la jarkotizon. Venontjare ni invitos al pago de la kotizo per cirkulera letero, anstataŭ ol per pagilo aldonita al "*SES informas*".

La estraro decidis okazigi la Ĝeneralan Kunvenon 2001 je la 7-a de aprilo en Bern.

Laŭ propono de Perla MARTINELLI, la estraro konsentis akcepti inviton al la Mez-Eŭropa Konsultigo en Praha septembre 2001, kie ŝi pretas reprezenti SES-n.

La prezidanto: Bruno GRAF

Svisa kalendaro pri esperanto-eventoj

Sonja BRUN lanĉis la ideon de svisa kalendaro por eviti datokoliziojn en la organizo de kunvenoj. Evidente la esperanto-vivo en Svislando plivigliĝas, kunvenoj kaj renkontiĝojoftiĝas, kaj kelkaj okazis samtage. Nia bulteno regule informas pri tiuj eventoj, sed ne kronologie.

Ekde novembro Dietrich WEIDMANN malfermos perrete info@esperanto.ch "*Esperanto-Kalendaron*" sub la adreso:

<http://www.esperanto.ch/kalendaro>.

La saman kalendaron aperigos en

"SES informas" Claude GACOND
gacond@bluewin.ch.

La prezidanto: Bruno GRAF

Porinforma enketo

En julio la estraro enketis per cirkulero rilate la kolektivitan abonon de la revuo "*Literatura Foiro*", submetinte du demandojn. Ni dankas al la membroj, kiuj okupiĝis pri la problemoj. Nun ni informas pri la rezultoj.

Revenis 81 kuponoj. Ni nombris ankaŭ tiujn, kiuj alvenis post la datlimo. La duono de la membraro respondis, kio estas ĝojiga, se oni komparas kun la jarkunveno, en kiu ĉeestas kutime nur po 25 membroj.

Jen la du demandoj kaj la rezultoj:

1. Ĉu vi subtenas la ideon, krei du kategoriojn: membroj kun LF kaj membroj sen LF? 74 jes, 7 ne.

2. Ĉu vi deziras daŭre ricevi la revuon "*Literatura Foiro*", tio estas esti membro kun LF? 25 jes, 50 ne.

La rezulto estas tre klara kaj ebligas al la estraro, decidi laŭvole de la membraro kaj prepari la proponojn por la ĝenerala kunveno. Per tiu enketo ni ankaŭ sciigis, ke unu duono de la membraro interesiĝas pri la aferoj de la

societo kaj ke la alia duono estas plimalpli pasiva.

La prezidanto: Bruno Graf

Enketo-LF/Konkurso

En la sukcesa programo de la Orientsvisa Kultura Semajnfino septembra en Zürich dronis la lotumado de la CD-disko de "*Freundeskreis*" inter la respondoj de la enketo. Mia filino Jasmin, tamen tiris slipon kaj la gajnanto estas Nancy FONTANNAZ en Pully. Kun gratulletero la prezidanto de SES transsendos tiun ĉi diskon al la gajninto.

Dietrich Weidmann

Servoj

Al la SES-anoj mi ofertas senpagajn servojn:

TV-programo: t.e. vidbendoj

Radioprogramo: t.e. sonbendoj

Esperanto-gazetojn el esperantio!

Bonvolu peti la liston al mia adreso:

Dieter ROOKE, Äussere Klus 11,
4702 OENSINGEN.

Donacoj

Donacoj en CHF al SES :
Paule VUILLEUMIER, La Chaux-
de-Fonds: 25; Armin WEIDMANN:
30. Sume: 55.

Donaco por la Agado 2003 :
Françoise BADOUX, Pully: 20;
Nancy FONTANNAZ, Pully: 50;
Walter KOBELT, Arbon: 10; Hans
MEIER, Basel: 29.45; Luciano
ORTELLI, Luzern: 20; Dieter
ROOKE, Oensingen: 20, Richard
SCHNELLER, St. Gallen: 50;
Christiane SIXTUS POT,
Perly/Genève: 50. Sume: 249.45.

La SES-kasisto Elisabeth
LAUPER dankas al la registritaj
donacintoj kaj anoncas, ke SES
malfermis la ĉisekvan poŝtan
ĉeko-konton: 17-581908-4, Svisa
Esperanto-Societo, 2300 La
Chaux-de-Fonds.

Ĉiu certe bonvenigos la ĉi-aldon-
itan specimenan ekzempleron de
poŝta pagilo al tiu nova konto, por
fari kristnaskan aŭ finjaran
donacon al SES, esprimante tiel
sian apogon al la laboro efektivi-
gita en la jaro 2000.

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo
Progrès 33, 2305 La Chaux-de-Fonds
☎ 032 967 68 55.

Retpoŝto: <gacond@bluewin.ch>

Raporto

Dum la studsabato de la 21-a de
oktobro la partoprenantoj travivis

unuan rendezuon kun la aŭtoro de
"La Litomiŝla Tombejo". Per
atenta trastudo de la 36-a ĉapitro
de lia romano, ĉiuj entuziasmiĝis
pri la precizo, elvokivo kaj aktual-
eco de la stilo de Karolo PICH.
Impresiga teksto beletre ege
originala, en kiu sportinto meditas
pri sia iama ciklistika pasio. Li
intensive revivas sian hobion kaj
travivigas ĝin al la legantoj. Ne
multaj esperanto-verkistoj tiel
vigle transdonas siajn impresojn
kaj pensojn.

Bedaŭrinde pro feria kaŭzo pluraj kutimaj studantoj ne povis ĉeesti tiun ĉi studsabaton. Claude GACOND volonte donace sendos tiun unuan rendezuon al ĉiuj dezirantoj sin pretigi al dua rendezuo kun Karolo Piĉ, kiu okazos dum la januara studsabato.

Venontaj studsabatoj

Claude GACOND senpage helpadas la studantojn kaj instruantojn de esperanto per la regula organizo de tiuj didaktikaj studsabatoj okazantaj principe ĉe CDELI la 3-an sabaton de la monato ekde la 10h00 ĝis la 12h45 kaj ekde la 14h15 ĝis la 16h00. Komuna tagmanĝo okazas en najbara italeca restoracio.

Jen la datoj de la venontaj studsabatoj :

Novembre 18 La fakulo pri komputiko André GROSSMANN instruos al ni kiel reale esperantigi la propran komputilon, por ke ĝi kapablu tajpi kaj retumi kun la necesaj supersignoj. Pro ĝia graveco ni anoncas tiun ĉi renkontiĝon titolpaĝe. La antaŭvidita studotemo estos do por alia fojo. Vi sciuj, ke André GROSSMANN estas ĵus emeritiĝinta el sia informadikista aktiveco ĉe la aŭtomobila firmao Peugeot, kie li laboris dum pli ol 30 jaroj kiel teknikisto. Li programis en la lingvaĵoj APL,

Nomad, Dbase kaj Access. Kaj hejme li programis per GFA Basic kaj Visual Basic. En esperantujo André GROSSMANN estis unue kasisto de Junulara Esperanto-Franca Organizo, antaŭ ol fariĝi la kasisto de Orient-franca Esperanto-Asocio. Tiun funkcion li plenumas jam ekde pli ol 30 jaroj. Kaj de 4 jaroj li ankaŭ fariĝis kasisto de Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj. De 10 jaroj li prezidas la lokan grupon Muhlhouse-Esperanto, gvidas kursojn en kulturdomo, korektas la perkorespondajn kursojn, kunlaboras al la eldono de la afrika revuo "Inter Ni". Do kun interesa personeco vi havos la okazon kontaktiĝi. Relegu la kovrilpaĝajn sciigojn kaj tuj aliĝu, kaj seeble venu kun via propra komputilo.

Decembre 16 Studsabato dediĉita al intimiĝo kun la verkaro de L. L. ZAMENHOF. Tio povos esti taŭga enkonduko al la monatfino okazonta samdate ĉe KCE.

Jam nun ni donas la datojn de la studsabatoj en 2001, por ke la interesatoj povu ilin rezervi en sia kalendaro :

2001 januare 20, februare 17, marte 17, majo 19, junio 16.

Claude GACOND

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Svisa ILEI-Sekcio

Mireille Grosjean, prezidantino

CP 9 Grand rue 9

2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18 88

grosjean9@caramel.com

La dimanĉon 29-an de oktobro inter la 17h00 kaj 17h30 okazis pertelefona ĝenerala asembleo de Svisa ILEI-Sekcio partoprenata de Nancy FONTANAZ, Jean-Noël FRIOT, Claude GACOND, Mireille GROSJEAN, François RANDIN kaj Jean-Thierry VON BÜREN.

La Svisa ILEI-Sekcio bedaŭrinde grupigas nur parton de la esperanto-instruantoj kaj de la instruistoj esperantlingvaj agantaj en Svislando, tial unu el niaj venontaj taskoj estos kreskigi ilian nombron. Nia sekcio konsistas nuntempe el 15 membroj. Ĝi povus esti duoble pli abunda kaj tiel pli efika en siaj rilatoj kun la aŭtoritatoj. Tial ni instigas ĉiujn instruantojn kaj instruistojn kontaktiĝi kun la ILEI-peranto François RANDIN, Vallombreuse 14, 1004 Lausanne, telefono kaj fakso 021 647 29 17 kaj rete: ilei.ch@esperanto.nu. Estas li, kiu kolektas la jarajn kotizojn, kiuj altas je nur CHF 20. La anoj ricevas la bultenon "*Internacia Pedagogia Revuo*".

Mireille GROSJEAN akceptas prezidi la sekcion. Ŝi raportis pri sia agado:

a) En julio ŝi partoprenis en Paris la asembleon de la "Association mondiale des éducateurs à la Paix", en kiu ŝi reprezentis UEA-n. Ŝi organizis svisan vesperon kaj tiel renkontiĝis la svisoj diverslingvaj, kiuj decidis la fondon de tutsvisa sekcio sub la nomo ASEPaix. Ŝi transprenis ĝian vicprezidantecon.

b) "Le Bureau International de l'éducation" en Genève, kiu estas filio de Unesco, organizas internacian asembleon ĉiujn kvar jarojn. La venonta okazos en septembro 2001. Kiel por la pasinta, estus bone, ke pluraj sekcianoj listiĝu kiel delegitoj de ILEI. Mireille GROSJEAN alvokas je tiurilata kunlaboro.

c) La Konsilio de Eŭropo en Strasbourg proklamis la jaron 2001 "Eŭropa jaro de la lingvoj", kio instigu nin vigle informadi pri la didaktika valoro de esperanto en lernejoj medioj. Claude GACOND mencias, ke li verkas dosieron, kiun li havigos al la porinstruistaj lernejoj kun propono dediĉi tagon al la ekzameno de la didaktika valoro de esperanto. Li submetos tiun ĉi dosieron al la ILEI-kolegoj. Ĝi certe povos

ankaŭ utili por aliaj kontaktoj kun pedagogiaj medioj.

d) En Tel-Aviv Mireille GROSJEAN akceptis troviĝi inter la tri ILEI-reprezentantoj ĉe Unesco en Paris.

e) Konkluda diskuto rilatis al la aktualaj debatoj sekve al la anonco far Ernst BUSCHOR, la zurika ministro de edukado, pri la decido instrui la anglan antaŭ la franca en la zurikaj lernejoj. Ekzameno de la reagoj montras neunanimecon al tiu decido ĉe la zurika instruistaro. En Romandio la debatoj plurfoje pozitive raportis pri la valoro de esperanto. En 2000 la plej menciindaj pri-esperantaj artikoloj aperis en la maja numero 9 de la bulteno "*Résonances*", (16 paĝoj) organo de la francilingva instruistaro en Valezo, en la taggazeto "*Le Temps*" je la 20-a de septembro (tuta paĝo) kaj en la septembra numero 10 de "*L'Edicateur*" (2 paĝoj). Tiun lastan artikolon verkis Mireille GROSJEAN sub sia pseŭdonomo Sophie GRAUBERT.

Anonco de Dieter ROOKE

por

Internacia Kolektivo de Esperanto-
Komunistoj

IKEK-Konferenco okazos ĉe KCE inter la 24-a kaj la 28-a de majo 2001. Al-
iĝojn sendiĝu al Dieter ROOKE, Äussere
Klus 11, 4702 OENSINGEN.

KCE

Kultura Centro Esperantista

Strato Postiers 27, Poŝtfako 311

2301 La Chaux-de-Fonds.

☎ kaj fakso: (032) 926 74 07.

<kce.esperanto@bluewin.ch>

KCE en Tiĉino

En la tiĉina urbeto Biasca la 30-a de septembro estis dediĉita al "Omaĝo al la fratoj ROSSETTI". Kial ĝuste Biasca? La respondo ĉiuj eksciis el la interesa prelego de Giorgio SILFER. La familio de Cezaro kaj Reto ROSSETTI vivis en Biasca antaŭ ol migri al Skotlando komence de la 20-a jarcento. La plej aĝa frato Cezaro (1901-1950) estis vendisto. Pri tiu ĉi profesio li verkis la famiĝintan libron "*Kredu min, sinjorino!*", en kiu li rakontas tre humure pri siaj kolportistaj spertoj. Kial omaĝo nun? Ĉar Cezaro forpasis antaŭ ekzakte 50 jaroj je unu jaro post la apero de sia romano.

Reto fariĝis profesoro pri belarto kaj aŭtoro de multaj esperanto-verkoj poeziaj kaj prozaj. Li vigle kontribuis al la maturiĝo de nova literatura epoko per sia kontribuo al "*Kvaropo*" en 1952. Li forpasis antaŭ jardeko.

Ne nur pri ambaŭ famaj verkistoj Cezaro kaj Reto ROSSETTI prelegis Giorgio SILFER, sed ankaŭ pri sia projekto de *"Historio de la esperanto-literaturo"*, kiun li estas kunverkanta kun Carlo MINNAJA.

En la distra programo okazis kantado de Anjo AMIKA kaj Dieter ROOKE deklamis la poemon *"Estas mi esperantisto"* de Julio BAGHY.

Reĝustigo

Sonja BRUN, la prezidanto de KCE reagis al miaj pasintnumeraj sciigoj. Mi citas ŝian retmesaĝon de la 15-a de septembro:

"Dankon pro la ampleksa kaj bele prezentita *"SES informas"* 2000-4 kun la multaj diversflankaj informoj. Bedaŭrinde englitis misinformo sub KCE / Raporto. La lasta frazo sub "novaj organoj" - *"Claude GACOND estis eliminata el ĝi"* - ne aperis en *"Heroldo de Esperanto"*, sed estas aldonaĵo kaj eĉ malprava. Claude GACOND

1. ne estis eliminata, sed ne plu elektita (kiel cetere kelkaj aliaj) kaj
2. restas en la Kultura Konsilio de KCE kiel delegito de CDELI, kvankam CDELI momente ne plenumas la laŭstatutajn kondiĉojn por havi delegiton.

Mi petas vin, aperigi adekvatan korekton en la proksima numero de

"SES informas" kaj ankaŭ klare diri, ke la informo pri la Kultura Konsilio ne estis donita de la sekvaj subskribintoj.

Dankon kaj sincerajn salutojn, KCE, Sonja BRUN, prezidanto."

Mi simple respondos, ke neniam CDELI plenumis kaj plenumos la kondiĉojn menciitajn, ĉar ĝi estas ne esperanto-organizo, sed fako de publika biblioteko. Por la informoj donataj en *"SES informas"* koncerne al KCE miaj fontoj estas ne nur *"Heroldo de Esperanto"*. Estas fakto, ke malgraŭ mia daŭra helpego al KCE kaj LF-koop mi ne estis reelektita, do eliminata el la Kultura Konsilio de KCE. Mi dankas al la voĉdonintoj, kiuj eĉ ne donis la voĉdonrajton al Nicole MARGOT, la delegito de SES anstataŭ Elisabeth LAUPER, kiu ne povis ĉesti pro la ŝanĝo de la dato de la asembleo.

Claude Gacond

Venontaj monatfinoj
Novembre 25-26 Enkonduko al la fonetiko de esperanto laŭ la plej aktualaj esploroj.

Decembre 16-17 Zamenhofaj Tagoj kun specifa studo pri la vivo kaj verkaro de la fratoj ZAMENHOF Felikso, Leono,

Henriko kaj Aleksandro sub la gvido de Walter ZELAZNY.

2001 Januare 27-28

Matene: Asembleo de KCE - cetera programo decidota.

Februare 24-25 Studtemo decidota - vespere verda karnavalo.

Marte 24-25 Matene: Asembleo de LF-koop - poste studoj pri Hector Hodler

Aprile 12-16 Printempa Sesio de Plurnivela Internacia Kursaro, kurso pri metodiko fare de Stefan Mac Gill.

28-29 Temo decidota.

Maje 26-27 Temo decidota.

Junie 23-24 aŭ 30-1 julio Omaĝo al Gaston Waringhien.

Julie 31 ĝis 20 aŭgusto Plurnivela Internacia Kursaro (PIK).

Detaloj estas regule publikigitaj en "*Heroldo de Esperanto*" kaj ankaŭ haveblaj ĉe la administrejo de KCE, CP 311, Postiers 27, 2301 La Chaux-de-Fonds. Tel/Fakso 032 926 74 07. Rete: kce.esperanto@bluwin.ch. La administrejo ankaŭ prizorgas la aliĝojn kaj la loĝadon de la partoprenantoj.

Sonja BRUN

SAEF

Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj
Gertrud Eggenberger, Wurmbühlstr. 10
8405 Winterthur ☎ 052 233 47 64

Pri la SAEF-jubileo en Luzern

La jubilea kunveno estis tre sukcesa. Partoprenis al ĝi ĉirkaŭ 50 personoj, el kiuj gravaj reprezentantoj de aliaj fervojistaj fakgrupoj. Ĝin bonege preparis kaj gvidis Gertrud EGGENBERGER kaj Ernst GLÄTTLI. Post la interkona aperitivo en la stacidoma kafejo la partoprenantoj busis al la Trafikmuzeo, kie okazis la tagmanĝo - malavara omaĝo de SAEF al la festantoj - kaj la cetero de la programo, daŭre en du lingvoj: esperanto kaj (svis)germana. La du organizantoj laŭtlegis sintezan prezenton de SAEF, poste distribuitan paperforme. Sekvis salutoj de diversaj asocioj kaj instancoj. Mi salutis nome de SES, gratulante pri la modela ekzemplo de paca kunlaboremo kun ĉiuj esperanto-realaĵoj en Svislando donata de SAEF. Sonja BRUN, nome de KCE kaj LF-koop, konkludis admirindan paroladeton per donaco al SAEF de tre aktuala eldono de LF-koop,

la libro de Zofia BANET-FORNALOWA "La familio ZAMENHOF".

Post la oficiala fermo de la solenaĵo ĉiuj havis la eblon viziti la ĉiam interesan Trafikmuzeon, kiu gastas interalie ekspozicion de la fama pentristo Hans ERNI.

Vere perfekta maniero festi la 75-jariĝon de SAEF, al kiu ni povas nur deziri longan vivon kaj pliajn sukcesojn.

Perla MARTINELLI

UEA

Universala Esperanto-Asocio

Sonja BRUN, ĉefdelegito kaj kongresperanto por Svislando.
Waldegstrasse 28, 6343 Rotkreuz.
☎ 041 790 46 40.

<smbrun@freesurf.ch>

Pri la 86-a UK

La kongreso de Tel Aviv estas jam historiaĵo kaj niaj pensoj turniĝas al la 86-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Zagreb. En la proksimaj semajnoj ĉiuj membroj de UEA ricevos de mi informojn pri tiu ĉiujare grava evento kaj samtempe vole nevole ankaŭ inviton rekotizi

por la jaro 2001. Do, bonvolu atenti pri viaj poŝtaĵoj kaj bonhumore bonvenigu la pagilon! Mi kore dankas en antaŭo.

Sonja BRUN

Korespondpetoj

El Ĉinio venis tiu ĉi peto:

"Karaj amikoj: Saluton! Ni estas Tangshan-a Esperanto-Asocio. Hodiaŭ ni skribis leteron al vi por unu peto. En nia asocio multaj esperantistoj volas korespondi kun esperantistoj de diverslandoj pri ĉiuj temoj, kaj volas interŝanĝi monerojn, poŝtkartojn, poŝtmarkojn, esperantaĵojn, ktp. Ĉu vi povas publikigi nian adreson en via revuo? Nia adreso estas jene:

TEA, P.O. Box 3, Tangshan HeBei, 063000 Ĉinio.

Ni atendas vian respondon. Antaŭdankon!"

Mi esperas, ke el Svislando sendiĝos salutvortoj al tiuj korespondemaj ĉinaj samideanoj. Realaj transcivilizajn rilatojn ili povus naski.

Claude GACOND

PS. Aliajn korespondpetojn mi povas transdoni al interesatoj. Ne ĉiujn mi povas anonci.

Loka aktiveco

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel

☎ 0049 76 214 57 12

Kunvenoj: 20h00 en Restoracio Weiherhof,
Neuweilerstr. 107

Novembre 11 Pretigo de la jarprogramo 2001. La kunsido okazos lastfoje en la restoracio Weiherhof.

Decembre 09 Zamenhofa Festo en Freiburg (Germanio). Interesatoj petu la detalajn sciigojn.

Pri la historio de la grupo

La oktobran numeron de la grupa organo *"Kuriero de Esperanto"* akompanis 16-paĝa broŝuro, en kiu estas publikigita prelego, kiun Heinrich RINGLI prezentis en 1980 por festi la 75-an jariĝon de Esperanto-Societo Basel.

Atentu ! Ekde januaro 2001 niaj kunvenoj disvolviĝos en

salono ĉe Haltingerstrasse 97. Ĝi estas la salono, en kiu okazis la fervojista kunveno okaze de la SES-jarkunveno kaj de la trilanda renkontiĝo.

Genève

Esperanto-Grupo "La Stelo"

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

☎ 022 740 04 45

Monata kunveno ĝenerale ĉiun unuan mardon en la restoracio *«Aux Cheminots»*, 7, rue des gares, Genève.

Novembre 7 Kun Odette FREGONARA pri Vojaĝo tra Vietnamio.

Decembre 10 Zamenhofa festo en Lausanne kun la LES-anoj.

Aspektoj de la problemoj de etnaj minoritatoj en Eŭropo

La prelegoj de Joachim MORITZ kaj Alain FAVRE pri la etnaj minoritatoj en Eŭropo kaj pri la

savoja lingvo vige interesis du-dekon da aliĝintoj al la kultura renkontiĝo de la 7-a de oktobro, kiu estis organizita sub la aŭspicio de SES. Ĉiu partoprenanto ricevis studindan materialon kun abundo da informoj kaj 20 mapoj. Tiu dokumentaro malkovrigas la lingvo-diversecon, kiu estas problema por la politikistoj konstruantaj Eŭropan Union, sed kiu estas samtempe riĉeco respektinda kaj kultivinda. Kiel montris Joachim MORITZ, ne ĉiuj minoritataj etnoj ĝuas pri la samaj agnosko kaj helpado. En Francio, kiel raportis Alain FAVRE, la regionaj etnoj estas minacataj en sia propra ekzisto pro la tradicia centralisma sinteno malfavora al ĉio ne plene franceca.

Publika konferenco de Claude Piron en UNI Mail

La 20-an de septembro plenpaĝa artikolo titolita "*L'anglais est la langue la plus inadaptée à la communication internationale*", publikigita de la taggazeto "*Le Temps*", tre interese raportis pri du intervjuoj: unu kun la lingvisto Claude PIRON en Gland, alia kun Marion BÉLISLE parolanta esperantlingve kun sia filo Romain en La Chaux-de-Fonds. Tiu tutpaĝa artikolo konkludiĝis per

anonco: ke la intervjuito Claude PIRON prezentos publikan prelegon la postan tagon.

Tiu neordinara okazaĵo alkurigis publikon de ĉirkaŭ 120 interesatoj pri lingvoj en la prelegejon de UNI-Mail la 21-an de septembro. Kaj post enkondukaj vortoj de Yvonne COTTON nome de la ĝenevaj amikoj de Claude PIRON, la lingvisto, psikologo kaj lingvo-amanto tuj montriĝis tre lerta preleganto. Pri tio atestas sonbenda registraĵo, kiun afable havigis al mi Nancy FONTANNAZ por la arkivejo CDELI.

Per tiu amatora sonkasedo oni bedaŭrinde ne bone aŭdas la demandojn de la aŭskultantoj en la diskuto konkluda al la parolado, sed tamen laŭ la respondoj de Claude PIRON, oni iom imagas ilin kaj divenas la entuziasmiĝon de la publiko.

Malfacilas resumi duhoran pironaĵon, kie abundas prilingvaj anekdotoj, humuraĵoj koncerne al fuŝtradukoj en la internaciaj konferencoj kaj atentigoj pri la individua valoro de ĉiu lingvo kaj pri la genieco de esperanto mem.

Koncerne al esperanto Claude PIRON tre atente klarigis, kial inter la lingvoj, kiujn li praktikas kaj esploris, ĝi estas lia preferata idiomo, ne nur pro sia nekredbla krea adapteblo, sia rapida ellern-

eblo, sia interlingva rolo efike plenumata, sed ankaŭ pro siaj realaj kultura kaj kulturiga valoroj.

Gratulon al la ĝenevanoj, kiujn finance apogis SES per kontribuo de CHF 1000, kaj al la preleginto, pro la sukceso mem de ilia entrepreno. Esperon ni konservu, ke el la dissemitaj veraĵoj prilingvaj, kelkaj ekkreskos favore al la fortikigo de esperanto en Genève kaj Svislando.

La oktobra numero de *"Brasikfolio"* mencias, ke la donacoj de la ĝenevanoj por tiu konferenco atingis la sumon de CHF 1'124, kaj telefone mi estis avertita pri la alveno de novaj kontribuadoj. Tio reale montras, ke la optimismo de la jaro 2000 estas preferinda al la pesimismo de la jaro 1999, kiam ĝenevanoj sin demandis, ĉu la grupo "La Stelo" estas malfondinda.

Kuraĝon antaŭen!

Claude Gacond

Prospekto de Nandir

Interne de *"SES informas"* 2000-5 troviĝas la nova prospekto de NANDIR kun mendilo pri liaj filmoj. Tiu bela katalogo klare reliefigas, ke François RANDIN ne restis pasiva. Kontraŭe! Li modele metis sian filmistan talenton je la

servo de esperanto. La mendila parto ebligas al vi ĉu kompletigi vian kolekton de liaj altkvalitaj video-filmoj, ĉu aĉeti originalajn donacojn kristnaskajn por viaj esperanto-amikoj.

Claude GACOND

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale : 389, 1009 PULLY

☎: (021) 729 58 02

<lausanne.ch @ esperanto.nu>

<<http://www.esperanto.ch>>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20h00

Diskuta rondo: ĉiulunde ekde la 19h30 ĝis la 21h00 ĉe François RANDIN, Vallombreuse 14, kiam ne okazas kunveno en la stacidomo.

Novembre 6 David YAKI EL CALGARY (KANADO) prezentos al la membroj de LES, kial esperanto ne jam pli vaste sukcesis. Ni kune esploros ideojn, kiuj eble helpus vendi esperanton profesie!

Decembre 10 Zamenhofa festo en la atika salono *"Delta"* ĉe la restoracio Place Neuve 3, 1009 Pully.

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
☎ 041 280 46 12.

Kunvenoj: ĝenerale ĉiun trian jaŭdon de la monato: 19h30: paroliga leciono; 20h00: babilado; 20h20: interŝanĝo de informoj; ĉirkaŭ 20h45: komenciĝas la anoncita parolado. Kunvenejo: Hotelo-restoracio Emmenbaum, Gerliswilstr. 8, 6020 Emmenbrücke, atingebla per trolebuso 2 de Lucerno kaj de la regiona trajno ĝis haltejo-stacidomo Emmenbrücke (100 m).

Dieter ROOKE prelegis la 19-an de oktobro pri la temo "edukado de infanoj en esperanto". Li provis montri la plej sukcesan manieron, por ke esperanto postvivu la jaron 2045! Prave li provas transdoni sian amon al esperanto al la propra filo, kiu veturis kun li al Tel-Aviv. Sed ĉu la esperanto-movado vere zorgas pri la infanoj kaj geknaboj? Verŝajne ne sufiĉe vigle. Paralele al la plenkreskulaj aranĝoj ne ofte okazas io interesa por la infanoj. Bedaŭrinde!

Novembre 16 je la 14h00:
Kompilo de la programo 2001 kun Paul SCHERER.

Aldone je ĉiu unua merkredo de la monato okazas paroliga kunveno kun Franz BRÜGGER inter la 14h00 kaj 16h00 en la restoracio Big Ben, Winkelriedstrasse 39. Venontaj datoj: novembro 8, decembro 6.

Kantono de Neuchâtel

La Chaux-de-Fonds

Esperanto en
"Ecole de la Grande Ourse"
strato Recrêtes 18

Dum la du lastaj jaroj la privata lernejo "*La Grande Ourse*", kiu aĉetis unu el la domoj de Gastejo Edmond PRIVAT, iniciatis instruadon de esperanto. Ĉar la gepatroj deziris ankaŭ ekstudi la lingvon, je la semajnfino de la 28-29-aj de oktobro kunlabore kun KCE organiziĝis studrondoj, kiujn gvidis Jacqueline POUX, Giorgio SILFER kaj Olivier TZAUT, kies gitaro tuj alportis viglan kanteman etoson.

Du el la grupoj konsistis nur el geknaboj kaj la tria el infanoj kaj gepatroj. Fine de la dimanĉa mateno dum unu horo Olivier TZAUT estis petita paroli al la gepatroj pri la ekstarto de esperanto kaj pri ties historio kaj vortfaradaj karakterizaĵoj. Montriĝis, ke iuj el la gepatroj ŝatus ankaŭ studi la lingvon, tio paralele al la lernaktiveco de siaj gefiloj.

Por helpi al "*La Grande Ourse*", Olivier TZAUT akceptis regule re-

veni por gvidi paroligan studrondon la ĵaŭdon matene dum sia provizora restado en La Chaux-de-Fonds.

En la duagrada lernejo

Post tralego de la artikolo aperinta en *"Le Temps"* du klasoj de la duagrada lernejo petis informojn pri esperanto al sia instruisto François BONNET. Tiu ĉi informis ilin pri mia ekzisto, kaj mi devis dufoje prelegi po du lecionojn pri esperanto al tiuj tre interesataj gelnantoj. Kelkaj poste ekvenis al CDELI por ricevi lernmaterialon. Mi anoncis al tiuj, ke la mardon de la 17h00 ĝis la 17h45 ĉiuj interesatoj pri esperanto povos veni ĉe CDELI por lertiĝi en la parola praktiko de la lingvo. Ĉu pere de ili revigliĝos la junularo? Ni vidos.

Claude GACOND

Studa rondo ĉe CDELI La Chaux-de-Fonds

Ĝenerale je la 2a kaj 4a merkredo de la monato de la 20h00 ĝis la 21h45 kun Claude GACOND.
Marde okaze de koncerto la merkredon.

Septembre diskutado kaj ludado, oktobre feriaj raportoj kaj strukturŝanĝa ekzercado, jen kio estis la aktiveco de la frekventantoj de la studa rondo, kaj tio en bonhumora

estoso. La venontaj kunvenoj okazos laŭ tiuj ĉi datoj :

novembre 7 kaj 22

decembre 13 Zamenhofa festeto kun laŭtleĝo de fragmentoj el kongresaj paroladoj.

2001 januare 10 kaj 23

februare 14

marte 13 kaj 28

Neuchâtel

Esperanto en ekspozicio de
la Biblioteko de la liceo

Jean-PIAGET

26 oktobro ĝis 31 januaro 2001

La 25-an de oktobro la Liceo Jean-PIAGET inaŭguris sian novan bibliotekon per prezento de ekspozicio titolita *"De l'époque de Jean PIAGET aux nouvelles technologies: sur les traces de Simon NARWITZ"*.

Kial tiu ĉi ekspozicio interesas nin? Ĉar Simon NARWITZ estis esperanto-praktikanto. Tial ni instigas la samideanojn nepre iri viziti tiun ekspozicion, kiu daŭros ĝis la 31-a de januaro 2001. Ĝi multon rakontas pri esperanto en la komenco de la dudeka jarcento. Pli mi ne diros, por ke vi havu la ĝojon mem renkontiĝi kun Simon NARWITZ kaj kun liaj esperanto-

